

Numero: 258.
Novembro: 2013.

21-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbel@t-online.hu
Eldonanto: Kapošvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Gravaj pensoj



Esperanto jam estas uzata lingvo ankaŭ en la ĉiutaga vivo. Malgraŭ tio, ke ekzistas homoj, kiuj asertas, la zamenhofa lingvo ne povas plenumi la rolon de internacia komunikilo. Tra la tuta mondo la angla disvastiĝis kaj milionoj uzas ĝin sur ĉiu tereno.

Multaj homoj opinias, Esperanto estas kontraŭ la grandaj mondlingvoj. Tio ne estas vera. Male: ĝi deziras kunlabori kun ĉiu lingvo de la mondo.

Estas konate, Esperanto servas la kulturon kaj lingvon de malgrandaj popoloj kaj nacioj. Pere de Esperanto la mondo ekkonis la literaturon de multaj malgrandaj nacioj, kies literaturo ne estus konata. Ĝia valoro estas nemezurebla per mono. Ĝi servas la tuthomaran kulturon kaj ĝi antaŭas sian epokon. Ofte estus pli bone, se ĝi estus kreata nur post kelkaj jarcentoj, kiam la socio maturiĝos por tia grandioza eltrovaĵo.

Nuntempe la homaro false vidas la lokon de la internacia lingvo sur la skalo de la lingvoj. Ankoraŭ ĉiu rigide kroĉiĝas al malbonaj kaj eksmodaj kutimoj. Oni vidas danĝeron en ĉio, kio ŝajne frakasas eksajn modelojn.

La mondo devos renoviĝi, se la homaro deziras eviti la totalan kulturan kaj ekonomian katastrofon. Tiutempe la uzo de lingvo diferencigis la homon de la besto. La evoluo de lingvoj kaj parolsistemo kondukis al la leviĝo de la pensmaniero. Verdire la pluan evoluon malhelpas la nombro de la parolataj kaj uzataj lingvoj.

La homaro bezonas duan gepatran lingvon, sed tiu lingvo devas esti sendependa, neŭtrala kaj ne lastfine facile ellernebla.

Ni esperu, baldaŭe la homaro rekonos la veran valoron de Esperanto kaj ĝin oni ne vidos malamikon. Ĝi ne estos primokita, flankenŝovita, kiam oni bezonas klaran, superfluan komprenon.

Estus bone, se tiu ĉi tempo alvenus rapide kaj la homaro ne devus atendi ankoraŭ jarcentojn.

-Redaktanto-



Mi lernos...



Mi lernos Esperanton, se ĝi estos disvastiĝinta en la tuta mondo. Ĝi ankoraŭ ne estas vaste uzata. Diru al mi, kiom da homoj uzas kaj parolas la zamenhofan lingvon?

Kiom vi diris? Tio estas malmulta. Tre malmulta. Se via lingvo estas tiom bona, tiam kial ĝi ne disvastiĝis en ĉiu lando?

Ne. Ne, mi ne deziras lerni tian lingvon.

Ĉu vi diras, ke ĝi estas facile ellernebla? Eble estus bona tia lingvo, kiun oni povas ellerni pli facile kaj rapide ol aliajn naciajn lingvojn. Sed laŭ mi via Esperanto estas nur ludilo por kelkaj fanatikuloj, kiuj kredas, ke ĝi povas solvi la lingvan babelan lingvoĥaoson.

Amiko, kedu min, ĝi estas nur bela, sed nerealigebla sonĝo.

Bone, uzu vian ludilon, sed ĝi ne interesas min. Se almenaŭ cent milionoj da homoj parolus Esperanton, tiam ankaŭ mi aliĝus al via tendaro. Sed tiel, kial mi penadu per laciga lingvolernado. Fine mi nenie povos uzi ĝin.

Mi ege bedaŭras, ke mi malgajigis vin. Komprenu min, per Esperanto oni ne povas komuniki en la mondo. Lasu mian konvinkon. Mi neniam lernos ĝin!

Ne. Mi ne koleras pri vi, kial vi deziris konvinki min. Eble iam ankaŭ vi komprenos, ĉi lingvo estas misvojo por la homaro.

Ne malgajiĝu! Ofte oni eraras. Baldaŭe ankaŭ vi vidos kaj spertos, Esperanto estas nur bela ideo. El ĝi neniam fariĝos mondlingvo. Ĝi povas esti nur iu nacia lingvo. Eble jam vi elpensis pri kiu lingvo mi pensas. Ĉu ne?

Nu, ridu jam! Ne estu trista. La homaro povos ekzisti ankaŭ sen Esperanto. Eĉ por ni estos beno, se ĝi fine malaperos.

Ĉu malgraŭ tio vi volas konvinki min?

Bone, mi lernos ĝin, se...

-Ŝaŝa-

Angelo.
El Lermontov.

En mezo de nokto en blua ĉielo Traflugis kaj kantis plej bela anĝelo. Kaj nuboj kaj steloj kaj lun' en irado Atentis kun ĝojo je l'sankta kanto.	Animon tre junan en brakoj li tenis; En mondo malgaja naskiĝi ĝi venis. Kaj sono de l'kanto en juna animo Restadis sen vort' sed kun viva estimo.
Li kantis feliĉajn, nesian pekantajn Spiritojn, kun Di' en ĉielo loĝantajn; Li kantis pri Patro ĉiela kaj tera — Kaj lia laŭdado ne estis malvera.	Tre longe en mondo ĝi estis premata, Je revo mirinda pri Di' plenigata! Kaj ŝanĝi la kanton de l'sankta sincero Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de l'tero.

V. Devjatnin.

Mia preĝejkonstruanta avo

Verkis: d-ro Bige Szabolcs

En la vilaĝo ĉiu tiel konis lin.

Post la posttagmeza duondormado mi ekmemoris pri mia avo. La preĝejkonstruanto. En la vilaĝo ĉiu tiel konis lin. Ankaŭ li dormis ĉiu posttagmeze unu horeton, sed estis malpermesita veki lin, okazu kio ajn en la mondo.

Iam ĉirkaŭ Kristnasko li atendigis ankaŭ la sinjoron juĝiston.

-Bonvolu sidiĝi altestimata sinjoro - diris mia avino al la gasto - ,mi alportos por vi iom da vino rizling ĝis edzo mia vekigos. Sciu sinjoro juĝisto, ne eblas veki la sinjoran Moŝton el lia posttagmeza ripozo pro nenio.

La sinjoro juĝisto laŭ la nomo Károly Kovács Kovácsi ne grumblis pro la atentigado kun la societo de kruĉo da vino rizling. Cetere li estis la ĉaskamarado de mia avo. Tio ĉi estis komprenebla, ja al la bieno apartenis granda arbaro, kie estis sovaĝbestoj, kaj ĉasistaj vilaoj. La sinjoro juĝisto ja estis fuŝĉasisto, sed ĉi tiun karesnomon oni ne decidis menci en sinjoraj rondoj. Tial tamen mia avo volonte gastigis lin dum ĉasadoj, kie la rango de la ĉefĉasisto estis, ke Károly Kovács Kovácsi prezentu la sovaĝbeston post ĉiu pafo. Kiuj ĝuste estis trafitaj - leporon, fazenon, apridon, kelkfoje vulpon, aŭ kapreolon. Li neniam povis mortpafi eĉ unu beston sed malgraŭ tio ĉasajo ĉiam estis sur lia tablo. Dank' al la ĉefĉasisto László Gerőffi. Unufoje tamen la sinjoro juĝisto havis bonŝancan trafon. Tio estis neforgesebla kazo. Li ekvidis ion brunan moviĝantan en la proksima arbusto. Li pafis dufoje kaj ĝi estis lia ĉashundo. Tie surloke ĉesis vivi la malfeliĉa besto....

Dume mia avo Kálmán vekigis el sia posttagmeza dormeto, kaj ekvidante sian ĉaskamaradon komencis admonadi mian avinon.

-Ve, Hermina mia, kial vi ne vekis min? Kial vi ne diris al mi, ke ni havas noblan gaston?

-Edzo mia, vi diris, neniun kuraĝu ĝeni vin, eĉ se mem la imperiestro dezirus enveni la domon.

-Imperiestro ne, sed Károly Kovács Kovácsi kiam ajn - etendis lian manon al la gasto.

La ĝojon de la akcepto li pliiĝis: li plenigis per vino la glasojn kaj li salutis la sinjoron juĝiston.

-Je nia sano! - intertintigis la glasoj ene kun la noblaj trinkajoj.

-Frato mia, Kálmán - komencis la gasto kiel li viŝis sian buŝon, kaj li kontente ekŝmacis - mi venis al vi persone en la nomo de la distrikto kaj la vilaĝo.

-Ĝi povas esti serioza afero, se vi jam tiel komencas, frateto mia!

-Temus pri preĝejo. Pri romkatolika preĝejo....

-Kiu ne ekzistas, ĉar ĝia turo terenfalas, eĉ ankaŭ ĝiaj muroj.

-Ĝuste pri tio mi deziras paroli. Ni faras monkollektadon en la rondo de la kredantoj je la propono de la sinjoro episkopo, kaj ni konstruos novan preĝejon el memforto!

Mia avo fariĝis saloidolo. Rigide li sidis sur la ŝpinita seĝo. Kelkajn momentojn li restis tiel kaj li ekstaris.

-Tiam tamen ne estis vane oferti por la kapitulo de Várad la dekonon de ĉi jara enspezo de la bieno! Frateto mia, vi alportis bonan novaĵon en mian domon.

-Pro tio mi venis unue al mia frato Kálmán, por ke mi demandu, kiom vi deziras oferti por la konstruo de la

preĝejo? Pro la manko de preĝejo la kristnaskan meson celebros la animzorganto Timotheus en la granda salono de la vilaĝdomo. Post la sankta meso ni anoncos la aferon de la preĝejkonstruado kaj la oferton de via sinjora Moŝto....

-Kio ĉi momente kostas kvar eksvirbovoj! Krome lignomaterialo el la arbaro kaj la tuta salajro de la vekto!

Tiel ekis la granda entrepreno - la preĝejkonstruado el memforto. Progresis bone kaj bele la afero. Prepariĝis la preciza plano, alvenis la permeso de la episkopo kaj la departamentaj oficejoj. Tio postulis unu jaron, sed en la sekva printempo oni surmetis la fondoŝtonon. Oni celebriis subĉielan meson, kaj venis ankaŭ la episkopo el Várad por beni la lokon.

Startis la laboro, kiel estis bezonata, mankis nek materialo, nek labormanoj. Venis la kredantoj, eĉ el aliaj konfesianoj memvole. Jam la muroj estis konstruataj, kiam vidiĝis la unuaj problemoj. Depost semajnoj ne pluvis eĉ unu guto, kaj la akvo de la putoj komencis elĉerpiĝi. En la fluejo de la rivereto trafluanta la vilaĝon apenaŭ fluetis unu fingro da akvo. Kaj tiu ĉi situacio fariĝis de tempo al tempo pli grava. Al la sekeco aldoniĝis eĉ ankaŭ la somera varmego. La homo, besto, planto ĉio suferis pro la terura vetero. Fine ĝi kondukis al tio, ke en la putoj la sitejoj pleniĝis nur de kotolikvaĵo. Poste jam ankaŭ ĝi mankis.

Malgraŭ tio la homoj ne ĉesis la preĝejkonstruadon. Ili obstine daŭrigis ĝin - ili malsupreniris sur la fundon de la putoj kaj per masonistaj karafoj ili ĉerpis la koton en sitelojn kaj per ĝi ili konstruis la muron ĝis ankaŭ la koto elĉerpiĝis.

La viroj, virinoj kaj infanoj ĉirkaŭstaris la duone konstruitajn murojn kaj ili ploris. La parokestro preĝis kaj la kredantoj plorete kantis la sanktajn kantojn. Super ili brilis la kruela suno, kaj blindigante bluegis la ĉielo. Ili ne rimarkis, kiam mia avo alvenis per ĉaro. La ĉaro estis tiritaj pere de kaleŝĉevaloj kaj sur la ĉaro estis tri gigantaj bareloj.

-Homoj! - li voĉkriis. - Daŭrigu la laboron!

-Kioo? - ekmuĝis la homamaso.

-Vi aŭdis bone. Se vi ne havas akvon por la ligmaterialo, ĉi tie estas tri bareloj da vino, ĝin uzu anstataŭ akvo. Se ĝi elĉerpiĝos mi denove alportos.

Tiel konstruiĝis la preĝejo je la gloro de Dio kaj tiel fariĝis mia avo preĝejkonstruanto.

Tradukis: Apáti Kovács Béla



Poezio

Poezio

VIKTOR ĈALDAJEV



Ruso, siberiano. Naskiĝis en 1945. Ricevis mezteknikan kleron. Esperantistiĝis en 1965. Partoprenis en multaj sovietiaj kaj ruslandaj belartaj konkursoj; en ĉiuj estis premiita. Originalaj poemoj aperis en Amikeco, Sezonoj, La Ondo de Esperanto, Literatura Foiro k. a. Loĝas en Barnaul.

* * *

Mi ŝatas, ke ĉio estu bela...

Jen!

Vidu!

Kiom da libeloj!

* * *

Konstruus mi el radiaj steloj!

Ke hele lumu ĝi

dum jaroj

mil kaj mil...

Jen kuras tempo

tag' post nokt'

ŝajncele...

nerimarkeble...

Kiel hormontril'.

LA KONFESO

Kion donos

por vi kastelon

mia

amo al la via?

Nurajn ja turmentojn,

ankaŭ... —

plu nenion...

Do, mi tiru sola

mian vivo-ĉaron

kun kontent' konsola

pro l' incita knaro.

FOTONO

Fantoma foton',

vivanta en mallum',

estas vi eton'

da nun' kaj nenun'...

Eta la id'

de Eter' vibrata,

ita — ata...

ita — ata...

itata...

* * *

Papero,

plum'

kaj sopir',

por la inspir'

ja nenio plu...

* * *

Ho, kia estas enuo

pro tiu ĉi konstanta

verda

menuo...

Dum tuta vivo

ĉu nur esperi?

Kaj ne aspiri?...

Kaj ne superi?

ESTI FELIĈA

Memor',

alflustru por mi

iom da agrablaĵo...

ŝajnas, ja, ĉe vi kaŝitas

ioma valor' senrusta,

ĝi, eble, — la orer'

el naiva juna revo,

kiu kiel eta stel'

nun apenaŭ traradiiĝas

inter fantomaj nebulozoj

de l' forpasantaj rapidaj jaroj.

Memor',

tiel eble ion ĉi donu

por la kor',

ke nur dum ĉi moment'

esti feliĉa.



Por infanoj

Saĝa knabino

Hungara popolfabelo

Kaj estis kaj ne estis, muelisto havis belan saĝan filinon, kiu estis tiom saĝa, ke ŝia famo estis konata en sep landoj. Tion ekaŭdis la reĝo. Li mesaĝis al ŝi, ke subtegmente li havas centjaran kanabon, ŝi spinu ĝin kaj el ĝi ŝi faru silkofadenon.



La knabino remesaĝis: mi havas centjaran heĝobarilon, la reĝo farigu el ĝi orobobenon tiam ŝi volonte spinos la orofadenon, ĉar la reĝo ne povas devigi ŝin spini orofadenon per aĉa lignobobeno.

La respondo plaĉis al la reĝo. Denove li mesaĝis al la knabino: mi havas subtegmente truan kruĉon, ŝi flikadu ĝin, se ŝi povos.

La knabino denove remesaĝis:

– Mia reĝa Moŝto, bonvolu renversigu la kruĉon, ĉar eĉ ŝia avo ne aŭdis, ke oni flikis ion sen renverso.

Tiu ĉi respondo ege ekplaĉis al la reĝo. Fine li mesaĝis al ŝi:

– Vizitu min, sed nek iru, nek venu, salutu min kaj ne salutu min, donu al mi donacon kaj ne!

Ekaŭdante tion la knabino, ŝi petis de sia patro lian azenon kaj ŝi sidiĝis sur ĝian dorson. Tiel li iris al la reĝo. Ankoraŭ hejme li kaptis kolombon kaj metis ĝin inter du kriblilojn kaj la birdon ŝi portis kun li.



Kiam ŝi alvenis la reĝon, ŝi ne diris eĉ unu vorton, sed ŝi klinis sin kaj poste ŝi liberigis la birdon el inter la du kribliloj, kiuj tuj forflugis. Tiel la knabino ne iris, nek venis, ŝi salutis la reĝon kaj ne salutis, ŝi donis donacon al la reĝo kaj ne.

La reĝo tuj enamiĝis al la saĝa knabino, ke li petis ŝian manon kaj li edzinigis ŝin.

Ankaŭ mi estis invitita al la geedza ceremonio kaj mi tre, tre bonfartis. Se vi ne kredas, demandu mem la reĝon!

Jen la fin' eta porkido portu ĝin!

Tradukis: Onklo Adalberto



FANTAZIO

FANTAZIO

